# *Granda patrolando: latinamerika rokmuziko en Kubo.*




De la 14-a ?is la 18-a de novembro okazos por la unua fojo en Kubo, la festivalo de latinamerika roko “Granda Patrolando”, la? informis la organizantoj dum gazetara konferenco en la kultura centro de ARTex, “Submarino Amarillo” de Havano.
Humberto Cruz Hernández, prezidanto de ARTex kaj de la organiza komitato de la evento a?spiciita de la ministerio de kulturo, deklaris al la gazetaro ke kelkaj institucioj kulturaj kunpartoprenos la eventon, inter ili estas la EGREM (entrepreno de sondiskoj), la kuba agentejo de roko kaj la kultura Domo de ALBA.
Siaflanke, Sebastián Heredia, argentina promocianto, kiu anka? prezidas la festivalon, komentis ke ene de la ?efaj celoj de tiu ?i evento estas la ebleco ke la kubaj gejunuloj kaj rokamantoj konati?u kun la nuna situacio de tiu muzika ?enro en Latinameriko kaj aktuali?u; samtempe, estos bona okazo por ke la invititaj muzikistoj interagu kun la kubaj grupoj tre altkvalitaj kiuj per sia muzika verko kreis proprajn markojn kadre de la mondo de la latina roko.
La festivalo “Granda Patrolando” sukcesos kunfandi?on inter la rokfarantoj kaj ties sekvantoj, per koncertoj kie la konata Heavy Metal, la miksado de ritmoj, la alternativa roko kaj, speciale, en la hispana lingvo, havos ?efan rolon dum 5 intensaj agotagoj defendante ?enron, kiu kulturita en Latinameriko, akiras trajtojn sui géneris, ne nur rilate la muzikon, sed anka? kiel estetika koncepto kiu spegulas vivmanieron.

**Radio Habana Cuba**